La Hodiaŭa Ĵurnalo
2018-01-26 n-ro 428

# Dependiĝo de komputilaj ludoj kiel psika perturbo



Ĉinio sukcese klonis unuajn makakojn de la mondo per Dolly-metodo

Kiel kubanoj havigas al si enhavojn de la interreto

Pakistano kondamnas atakon de usona senpilota aviadilo en triba regiono

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Pakistano kondamnas atakon de usona senpilota aviadilo en triba regiono
*La senpilota aviadilo pafis du misilojn p. 03*

TRUMP urĝas Turkion sin deteni de agoj ebligantaj konfliktojn inter turka kaj usona armeoj
*En la siria norda regiono Afrin p. 03*

Dependiĝo de komputilaj ludoj kiel psika perturbo
*Monda Sanorganizo p. 04*

Ĉinio sukcese klonis unuajn makakojn de la mondo per Dolly-metodo
*Du klonitaj makakoj p. 04*

Soldatoj trinkas serpentosangon kadre de prezentado
*Nekutima militprezantado p. 05*

BOGATOV jam superflue persekutata
*La juna moskva esperantisto restas sub hejma aresto p. 05*

Glacirompilo *Krasin* – la rezervita heroo
*Rusia glacirompilo-muzeo p. 06*

Kiel kubanoj havigas al si enhavojn de la interreto
*Semajna pakaĵo p. 09*

Hodiaŭe
*Achim von ARNIM; kaj Birdo p. 10*

# Pakistano kondamnas atakon de usona senpilota aviadilo en triba regiono

Pakistano merkrede [24 jan 2018] kondamnis la atakon de usona senpilota aviadilo, kiun lanĉis la Misio de Rezoluta Subteno sub la gvidado de Usono kontraŭ la tendaro de afganaj rifuĝintoj en la nordokcidenta triba regiono.




Raportoj antaŭe sugestis, ke la senpilota aviadilo pafis du misilojn al konstruaĵo de suspektataj ekstremistoj en la nordokcidenta triba regiono *Orakzai* proksima al la landlimo kun Afganio, mortigante almenaŭ du homojn.

La Pakistana Ministerio de Eksterlandaj Aferoj diris en deklaro, ke Pakistano emfazas al Usono la gravecon dividi informojn por ke konvenaj agoj estu prenotaj kontraŭ teroristoj per iliaj fortoj sur ilia teritorio. La deklaro diris, ke Pakistano ankaŭ emfazas la bezonon de frua repatrujigo de afganaj rifuĝintoj, ĉar ilia ekzisto en Pakistano helpas al afganaj teroristoj sin kaŝi en la tendaro de rifuĝintoj. Ĝi aldonis, ke tiaj unuflankaj agoj malobservas la spiriton de kunlaboro inter la du landoj en la batalo kontraŭ terorismo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# TRUMP urĝas Turkion sin deteni de agoj ebligantaj konfliktojn inter turka kaj usona armeoj

Usona Prezidento Donald TRUMP kaj lia Turkia paralelulo Recep Tayyip ERDOĞAN telefone konversaciis merkrede [24 jan 2018] pri la situacio en la siria norda regiono *Afrin*. TRUMP urĝis Turkion sin deteni de ajnaj agoj, kiuj povus kaŭzi konflikton inter la usona kaj turka armeoj.



La Blanka Domo diris en deklaro, ke TRUMP esprimis sian maltrankvilon pri la intensiĝanta perforto en la regiono *Afrin*, dirante, ke tio povas malutili al la komuna batalo de la du landoj kontraŭ la ekstremisma grupo Islama Ŝtato en Sirio.

La 20-an de januaro la turka armeo komencis operacon en la siria norda regiono *Afrin* por bati la kurdajn armitajn fortojn.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Dependiĝo de komputilaj ludoj kiel psika perturbo

Monda Sanorganizo (WHO) baldaŭ aktualigos sian liston de malsanoj kaj sanproblemoj. En la 2018 aperos sur ĝi i.a. dependiĝo de komputilaj ludoj. La organizo rekonis ĝin kiel formon de psika dependiĝo, simile kiel tio estas kaze de hazardludoj. La aktualigita listo estos prezentita en majo. En la enkonduka, ankoraŭ ne oficiala, dokumento oni klarigas, ke la komputila ludo povas esti kvalifikita kiel psika perturbo, se homo perdas super ĝi kontrolon kaj okupiĝas pri ĝi en maniero obseda.



Tio signifas, ke temas pri fenomeno firma, revenanta, negative influanta tion, kiel koncerna persono funkcias en la familio, socio, kiel tio speguliĝas en la kleriĝado, laboro kaj aliaj vivaspektoj de la koncernato. La ludo en la vivo fariĝas afero prioritata, ĉiam pli ofte ripetiĝanta malgraŭ negativaj sekvoj. Ĝi estas diagnozebla kiel psika perturbo, se ĉi-speca konduto daŭras almenaŭ 12 monatojn.

La diskuto pri tio, kiel trakti obsedan okupiĝadon pri komputilaj ludoj, daŭras delonge kvankam esploristoj kaj psikologoj ne samopinias disputante pri tio, kiuj premisoj atestas, ke la komputila ludo de ŝatokupo transformiĝas en dependiĝon kaj kiel tion mezuri. La Internacia Klasifiko de Malsanoj de la Monda Sanorganizo estas listo uzata de kuracistoj kaj esploristoj. La unuaj uzas ĝin en diagnozado, la ceteraj por difini kategoriojn de sanstatoj kaj por la statistikaj celoj.

Pola Retradio

---

# Ĉinio sukcese klonis unuajn makakojn de la mondo per *Dolly*-metodo

Ĉinio ĵaŭde [25 jun 2018] anoncis, ke ĝi sukcese klonis la unuajn makakojn de la mondo el somataj ĉeloj per metodo, kiu kreis la ŝafon *Dolly*. Tio ebligas esploron pri mendeblaj [?] populacioj de genetike unuformaj simioj.




La du klonitaj makakoj, nomataj Zhong Zhong kaj Hua Hua, estis produktitaj en la nehomaprimata esplorcentro sub la Ĉina Akademio de Sciencoj en la fino de 2017. La komenca esploro estis publikigita en la retejo de la scienca revuo *Ĉelo*. De post kiam la ŝafo *Dolly* estis sukcese klonita el plenaĝa ĉelo en 1997, aliaj mamuloj estis klonitaj, sed por makakoj, kiuj havas striktajn rilatojn kun homoj, delonge estis defio.


Sun Qiang, direktoro de la nehomaprimata esplorcentro sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, kondukis la esploristan teamon dum tri jaroj por venki la biologiajn malfacilojn. Zhong Zhong kaj Hua Hua estas produkto de transigo de somatĉela kerno, la tekniko uzata por krei la ŝafon *Dolly* antaŭ 20 jaroj. Esploristoj redaktis genojn en provtubo kaj precize kribris kaj produktis somatajn ĉelojn kun la sama genotipo. Ili forigis la kernon el ovoĉelo kaj anstataŭigis ĝin per alia kerno el diferencigitaj korpaj ĉeloj.

Ĉi tiu sukceso signifas, ke Ĉinio pioniros en morba kaj cerba scienca esploro per klonitaj makakoj kiel bestoj.

Yu
ĉina Radio Internacia

## Soldatoj trinkas serpentosangon kadre de prezentado

Jim MATTIS, kiu estas la Usona sekretario pri defendado, merkrede la 24-an de januaro [2018] spektis nekutiman militprezantadon fare de indoneziaj soldatoj en Ĝakarto, la regurbo [ĉefurbo] de la azia lando.



Tiu ceremonio okazinta en la sidejo de la armitaj fortoj de Indonezio estis pli drameca ol tiuj kiuj la estroj de Pentagono (usona departamento de defendo) estas alkutimiĝantaj dum eksterlandaj vojaĝoj.

Je sonado de muzikistaro la indoneziaj soldatoj faris seriojn da batalartaj teĥnikoj, eĉ frakasigante kvazaŭ-betonajn brikojn, kaj per manoj kaj per kapo.

Eble la plej reliefiga faro estis tiu kun vivantaj serpentoj disĵetitaj tie de la armeo. Tiam, antaŭ la homamaso la soldatoj senkapigis la bestojn kaj trinkis ties sangon.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

---

## BOGATOV jam superflue persekutata

La kazo de Dmitrij BOGATOV evoluas espereble al bona solvo por la akuzito. La rusia ministerio pri internaj aferoj, pere de propraj ekspertoj, ne konstatis lin kulpa pro alvokoj al terorismo. Tamen la juna moskva esperantisto restas sub hejma aresto: li rajtas nek eliri nek komuniki ion eksteren, escepte al gefamilianoj.




Do kvankam la ministerio ne trovis pruvon pri lia kulpeco, la lasta vorto apartenas al tribunalo. La mallibereco de s-ro BOGATOV daŭras jam ok monatojn.

Intertempe Rusio enkondukis normojn kiuj limigas liberan interreton, interalie programojn de anonimigo. Tio povus igi politike superflua la persekuton kontraŭ BOGATOV. Kaj tial esperigi pri la rapida fino de ĉi tiu situacio. Jen optimisma konkludo ĉe Komitato Armand pri esperantistoj en prizono.

HeKo 670 7-C, 24 jan 18

# Glacirompilo *Krasin* – la rezervita heroo

Antaŭfoje ni disiĝis en la placo de la mara stacidomo en Sankt-Peterburgo post viziti la submarinon *“Narodovolec”* – la ŝarkon de la nordaj maroj, transformitan al muzeo. Nun ni direktiĝu suden – al la interkruciĝo de la 23- Linio (tiel nomiĝas malnovaj stratoj en *Vasilevskij*-insulo) kaj Kajo Leŭtenanto Ŝmidt. Tie trovis la finan haltejon la sola rusia glacirompilo-muzeo *Krasin*.



**Kamarado KRASIN – la homo kaj glacirompilo**

Post la malvasta submarino, tiu ĉi koloso ŝajnas esti paradizo por klaŭstrofobiulo – timu nenion, la spaco sufiĉas por ĉiuj! La personaro aspektas ne malpli impresa – aĝaj viroj en marista uniformo kaj imponaj virinoj, kiuj sendube ŝatas vastecon de la supra ferdeko. Mi tutkore dankas ilin, ja la ekskurso de nia ĉiĉeronino estis superba. Sed ĉu eblus fuŝe prezenti la historion de tia ŝipo?

Ĝi naskiĝis en *Newcastle upon Tyne* (Anglio) en 1916 kaj estis la dua arkta glacirompilo en la historio de Rusio. Se la unua estis nomita *“Jermak”* honore al la rusa konkerinto de Siberio, do tiu ĉi estis baptita *“Svjatogor”* memore al la legenda rusa antikva fortikulo. Sian laborvivon ĝi komencis en Arĥangelsko, kieĝi preskaŭ pereis jam en la “suĉinfana”, dujara aĝo.

Antaŭ lasi la urbon dum la Enlanda milito, la bolŝevistoj provis bari la vojon al la ŝipoj de la eksterlandaj aliancanoj de la Blanka armeo kaj tiucele dronigis la ŝipon en la riverbuŝo de Norda Dvino. Tamen eĉ tion ili faris fuŝe, do la angloj senprobleme levis ĝin kaj inkludis en sian ŝiparon. La sovetia diplomato devis klopodegi por post tri jaroj elaĉeti la perditan glacirompilon kaj revenigi ĝin en la hejmohavenon. Ĉu vi jam divenis la nomon de tiu ĉi diplomato? Ĝuste – tio estis kamarado Leonid KRASIN.

En 1926 la 56-jara bolŝevisto mortis kaj post kelkaj monatoj aperis la nova *Krasin* – tiel *“Svjatogor”* perdis sian denaskan nomon. Sub tiu ĉi titolo kaj ruĝa flago ĝi faros sian plej gravan heroaĵon, enironte la gloran historion de la esplorado de Arkto – ĝi savos la ekspedicion de Umberto NOBILE.

**Kiu manĝis Malmgren-on?**


La itala generalo decidis konkeri la Nordan poluson en aerŝipo nomita honore al lia sunoplena patrujo ”Italio”. Li sukcesis. La 11-an de majo 1928 la aeronaŭtoj startis de insulo Svalbardo kaj sukcese alteriĝis en Alasko, forĵetinte super la poluso kverkan krucosignon, kiun enmanigis al ili Papo Pio la 11-a.

Tamen dum la revena vojo la radiokonekto ĉesis kaj dum longaj naŭ tagoj regis plena silento. Poste oni eksciis, ke nur 100 km antaŭ Svalbardo pro forfluo de gaso la aerŝipo iĝis neregebla, sinkis kaj falis sur la glacion. Unu el la 16 vojaĝantoj pereis tuj, ses forflugis sur la aerŝipa ŝelo kaj malaperis, naŭ postvivintoj restis en la glacia kaptilo.

Post kolekti disĵetitajn aĵojn ili markis per ruĝa farbo sian tendon kaj sidiĝis interne, senĉese sendante SOS-signalojn en la blankan silenton. Marĝena rimarko: en 1969 la sovetia reĝisoro Miĥail KALATOZOV faris sovetia-italan filmon pri

la ekspedicio, titolitan "*Ruĝa tendo*".

La filmo estas spektinda jam pro la ĉefroluloj kiel Sean CONNERY kaj Claudia CARDINALE, kaj muziko de Ennio MORRICONE.



Baldaŭ du italaj navigaciistoj subestre de la sciencisto Finn MALMGREN decidis iri laŭ glacio al Svalbardo esperante renkonti tie ĉasistojn. Sed la helpo venis de tute alia, neatendita flanko. La 3-an de junio kampara radioamatoro Nikolaj ŜMIDT hazarde kaptis malfortajn signalojn el la Centra Arkto kaj sendis la informojn al Moskvo. Jam la 11-an de junio la skiparo de *"Krasin"*, kiu provizore haltis en Leningrado, ricevis urĝan ordonon – savi la ekspedicion de Umberto NOBILE.

La glacia stato en la loko de la katastrofo estis ege komplika, do en la lastaj tagoj dum unu deĵorperiodo (kvar horoj) la glacirompilo pasis averaĝe po 14 mejlojn. La 12-an de julio sur ĝian ferdekon leviĝis la grupo de MALMGREN, pli ĝuste du postvivintaj navigaciistoj – la delira Mariano kaj la relative sana Zappi. Tiu lasta rakontis, ke ilia estro, rompinta la manon dum la aerŝipa falo, tre malfortiĝis dum la marŝo, preskaŭ ne povis moviĝi kaj fine petis lasi lin en tombejo, elhakota en glacio. Tiu ĉi peto estis plenumita.

Kiam la informo tralikiĝis al amaskomunikiloj eksplodis grandega skandalo. Oni riproĉis Zappi pri malfortanimeco, perfido kaj eĉ kanibalismo!

La onidirojn flamigis tio ke Zappi surportis la horloĝon kaj parton de la vestoj de MALMGREN, dum mankis letero aŭ almenaŭ la lasta notico de la mortinto. Krome kompare al la ostiĝinta Mariano tiu ĉi navigaciisto aspektis tro dika kaj bonfarta.

**Aritmetiko de la sorto**

Samvespere *Krasin* atingis la glacion sur kiu troviĝis la lastaj kvin skipanoj. Mi ne misskribis, temis pri kvin personoj, ĉar la ekspediciestro generalo Umberto NOBILE lasis la glacion jam la 25-an de junio en aviadilo de la sveda piloto Einar LUNDBORG. Iuj povus nomi tion hontinda ago, sed ĝi estis sufiĉe racia – el sekura loko li povus pli efike gvidi la savoperacion. Eble tiu raciemo helpis al NOBILE travivi longajn 93 jarojn kaj morti hejme, en sia lito.

La 5-an de oktobro *Krasin* trapasis Finnan golfon por ankriĝi ĉe la Kajo Leŭtenanto Ŝmidt (la rusia revoluciulo neniel rilata al la menciita raioamatoro), kie ĝin renkontis miloj da ĝojoplenaj urbanoj. Tio estis triumfo de la sovetia glacirompila floto! En la unua internacia savoperacio partoprenis 1 500 homoj. 18 ŝipoj kaj 21 aviadiloj impetis por helpi al la teamo de Umberto NOBILE. Dum la savado kraŝis kelkaj aviadiloj, pereis tri italaj pilotoj kaj ses skipanoj de la franca aviadilo *"Latham"*, inkluzive de la legendeca polusa esploristo Roald AMUNDSEN. Naŭ herooj pereis por savi ok ekspedicianojn – la devosento ĉiam superas aritmetikon.

Post ioma tempo usona ĵurnalisto aldonis plian enigmon, ĉi-foje mistikan. Preninte el sia tablo bildkarton kun la ekspedicianoj, eldonitan antaŭ ilia vojaĝo, li rimarkis strangan aferon. La foto estis faldita laŭ la centro kaj la faldlinio ekzakte dividis la teamon je du partoj: maldekstre estis la ok postvivintoj kaj dekstre – la ok pereintoj. Malsupre en la centro staris meteologo MALMGREN, kiu insistis ke la ekspedicio revenu ĝuste laŭ tiu ĉi itinero – malgraŭ danĝera ventego kaj kontraŭe al la opinio de NOBILE. Kion diri? Ĉiu havas sian sorton...

**La polusa heroo**

Post la triumfa marŝo, *Krasin* iĝis la ĉefŝipo de la Karaaj maraj ekspedicioj. Ĝi faris la vojon al ŝipoj, elkondukis tiujn premitajn en glacio kaj en 1934 preskaŭ iĝis heroo de la nova arkta epopeo – savado de la ĉeluskinanoj. Post ekscii ke la sovetia ŝipo *"Ĉeluskin"* estas dispremita de la glacioj de Ĉukkĉa maro la skiparo de Krasin tuj impetis al la loko de la katastrofo. En sep semajnoj ĝi transiris Atlantikon, tra Panama kanalo eniris Pacifikon kaj jam preskaŭ atingis la cellokon kiam oni nuligis la ordonon.




Cetere por ĝi sufiĉis da heroaĵoj. Komence de la Granda patriota milito [1941] *Krasin* estis rearmita en Usono kaj Kanado kaj transformiĝis al la militŝipo. En 1942 ĝi eskortis la plej grandan arktan karavanon PQ-15 – trabatis por ĝi la vojon en la glacioj kaj samtempe forpelis germanajn bombaviadilojn. Samjare apud insulo *Dikson Krasin* forkondukis kargoŝiparon al la glaciejoj de la altaj latitudoj kaj tiel savis ĝin de atakoj de la germana batalŝipo *Admiral Scheer*.

En la postmilitaj jaroj la glacirompilo paŝon post paŝo forlasis la scenejon. En la 1970-aj jaroj *Krasin* estis transdonita al geologoj, kiuj forigis du vapormaŝinojn, transforminte ĝin en nuran vaporŝipon. Ĝin sendube atendis ferrubejo, sed ekprotestis maristoj, esplorantoj de Arkto kaj simplaj peterburganoj. Do ekde 1995 la glacirompilo ankritas ĉe la sama Kajo Leŭtenanto Ŝmidt, kiu estis la loko de ĝia plej granda triumfo.

**La rezervita, sed ne rubigita**

Kiel fartas *Krasin*? Sufiĉe bone. Plejparto de ejoj estas restarigitaj en la stato kiun ili ekhavis post la granda riparado de la 1950-aj jaroj, farita en GDR. Sur dikaj ŝnuregoj plu pendas kontraŭrataĵoj – metalaj diskoj, kiuj baras la vojon al la infektoportantoj. En la granda kajuto staras verdaj foteloj kaj en la centro – la fama tagmanĝtablo. Dum ruladoj oni kovris ĝin per malsekaj tablotukoj por malgliti la telerojn. Se tango fortiĝis oni levis la flankbarilojn. Kaze de forta ŝtormo aldoniĝis vandoj, kiuj dividis la tablon je kelkaj sekcioj. Kompreneble se iu plu havis apetiton...

Laŭ la ferdeko promenas nigra kato *Kuzja*, kiun la skipanoj prenis de sur glacio en 2005. Ili diras ke jam antaŭe sur la glacirompilo ofte loĝis nigraj katoj, do ili nur daŭrigis la tradicion. Sed ĝi ne estas la sola viva estaĵo – en 2006 oni levis el Neva... bonrasan virkokon! Neniu scias kiel la kompatinda besto trafis la drivantan glacion. Ĉasbirdoj forte taŭzis la parencon, seniginte ĝin je la fiera kresto, sed bestokuracistoj el la peterburga zoo rapide resanigis la kokon. Oni baptis ĝin simple, sed simbole – Umberto.

Do *Krasin* daŭrigas la noblan savmision. Tio estas apenaŭ mirinda afero, ja ĝis nun la ŝipo troviĝas en la mara registro kaj rajtas vojaĝi en la maroj. Ĝia statuso estas ne tre belsona – "la rezervita ŝipo". Sed la muzeaj kunlaborantoj elbuŝigas ĝin kun neimagebla fiero: "Ni estas ne rusta barĝo kiel "Aŭroro". Ni estas rezervo!"

Stano Belov
stanobelov.blogspot.com

# Kiel kubanoj havigas al si enhavojn de la interreto

Kubo estas preskaŭ komplete sen interreto - malgraŭ tio la homoj ĉiam ricevas la plej freŝajn informojn. Malantaŭ tio kaŝiĝas trukecaj datumkomercistoj.



Kiam la antaŭa usona prezidento Barack OBAMA vizitis Kubon, li ankaŭ menciis ke Guglo estis subskribinta negocon por alporti pli da sendrataj retaliroj kaj pli da larĝbenda interreto. Tio povus signifi ankaŭ por Kubo la komencon de la cifereca revolucio.

Ĝis nun nur ege malgranda procentaĵo de la loĝantaro havas hejman retaliron, ne malofte pere de 56k-modemo. La sonojn kiam la aparato provas starigi konekton en aliaj partoj de la mondo oni konas el la 1990-aj jaroj.

En la stratoj de Havano de antaŭ nelonge disponeblas ĉirkaŭ 50 publikaj sendrataj alirpunktoj por la interreto, tie eblas surfi je la prezo de 2 CUC-oj (konverteblaj pesoj) kio korespondas al 2 usonaj dolaroj. En la enirhaloj de grandaj turistaj hoteloj tio facile kostas la duoblon. Por normalaj civitanoj ambaŭ estas nepageblaj. Kaj eĉ tiuj kiuj kapablas pagi tion, ne havas liberan aliron al la reto. Multaj retejoj, inter ili ŝtatkritikemaj novaĵportaloj aŭ la telefonprovizanto Skajpo, estas blokitaj.

Ne estas hazardo ke tiu ekstreme bone kleriĝinta insula popolo estas konata tamen ankaŭ por sia kreiva mastrumado de la deficita ekonomio kaj de la cenzuro. Anstataŭ atendi la ciferecan reton por kontentigi sian bezonon pri informoj, la kubanoj mem amatore konstruis analogan reton.

Ĉe enveturejo al korto en la kvartalo Vedado de Havano sidas Pablo kaj Daniel, ili aĝas 24 kaj 27 jarojn, en sia malgranda vendejo. Ĉu vere vendejo? Principe temas nur pri skribotablo sub lada tegmento kaj granda komputilo. Malantaŭ la du junaj viroj pendas ŝildo kun la surskribo "*Master Copy HD*", sur iliaj vizitkartoj staras "Kopiservo kaj elprintoj." Sed fakte ili ofertas ion alian. Estas duone laŭleĝa servo kiu dum la pasintaj jaroj en Kubo evoluis al granda negocbranĉo: "Interreto sen retkonekto".

Ĉiudimanĉe la du negocistoj ricevas de sia inform-liveranto porteblan fiksdiskon kun 900 gigabajtoj da freŝaj datumoj: usonaj televidaj serioj, novaj filmoj el la tuta mondo, afrokubaj hip-hop-trakoj, pdf-dosieroj de gazetoj kaj magazinoj, aktualaj sportrezultoj, diversaj komputilaj ludoj kaj paĝoj el Vikipedio. Tiujn datumojn la du negocistoj tiam vendas ekde lunde matene al siaj klientoj, de portebla fiksdisko al portebla fiksdisko, per USB-kablo. Temas por tiel diri pri momenta registraĵo de la interreto, en kiu oni tiam dum unu semajno povas surfi sen retkonekto.

La sistemo estas konata en Kubo sub la nomo "*paquete semanal*" (semajna pakaĵo). Lunde kiam la datumoj estas tute freŝaj, la negocistoj postulas tri CUC-ojn por tio. Dum la semajno la prezo falas al du CUC-oj kaj fine al unu CUC-o. Por iliaj klientoj tio estas ankaŭ pro tio signife pli malmultekosta ol la publikaj alirpunktoj, ĉar la semajna pakaĵo povas esti pluvendata al amikoj kaj najbaroj. Jen kundividado de datumoj laŭ la kuba maniero.


Kaj ĉu eblas riĉiĝi per tio en la Kubo de la transira periodo? "Nu, funkcias", diras Daniel, "la konkurenco estas granda". Ĉe alia proksima

stratangulo jam sidas pluaj vendistoj. En la nelonga pasinteco en Havano evoluis kompleksega sistemo el informprovizantoj, interkomercistoj, kurieroj kaj alportantoj, kiuj liveras fiksdiskojn kaj USB-stangetojn ankaŭ hejmen. Ĉio tio funkcias principe kiel en la TTT, nur ke en tiu kazo piedoj, motocikletoj kaj kamionetoj transpontas tiujn vojojn por kiuj alikaze kompetentas kabloj el vitraj fibroj.

Estas evidente ke neniu povas konsumi tutan terabajton da informoj ĉiusemajne. La sistemo estas sukcesa ĉar ĝi donas la impreson pri senlima libereco, aŭ pli bone dirite de preskaŭ senlima libereco. Kio ne haveblas, tio estas pornografiaĵoj kaj gazetoj de la ekzilkubanoj en Florido.

Tio kondukas al la ne sensignifa demando: Kiu principe kunmetas dum ĉiu semajnfino la originalan pakaĵon? Neniu scias tion. Oni flustre diras ke tio venas de tute "supre". Kaj tio garantias ke la sistemo ankoraŭ dum sufiĉe longa tempo funkcios, ĉar multaj homoj de tute supre ĝis malsupre bone profitas de ĝi.

Esperanta Retradio



## Achim von Arnim

**Achim von Arnim [aĥim fon anim], plennome: Ludwig Joachim von Arnim, (naskiĝis la 26-an de januaro 1781 en Berlino, mortis la 21-an de januaro 1831 en *Wiepersdorf* apud *Jüterbog*) estis germana poeto. Li estis grava reprezentanto de la romantikismo.**

**En Esperanto aperis: *La kanto pri Turo Babilona*.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

***Buteogallus meridionalis*,**

**Brazilo.**

**Vikipedio**